

Kalvaria vojo 1

Antifono (d-minora):

Krist' Je - su', ni be - nas Vin.
Vi - a kru-co, Vi - a mort': Sav' al ni.

KRIST' JESU', NI BENAS VIN • Antifono • M kaj E: Albrecht Kronenberger
2022-08-11

La stacioj (9a tonalo):

1. Jesuo estas kondamnata al morto

La Filo de homo / estos transdonita al la ĉefpastroj
kaj skribistoj; * kaj ili kondamnos lin al morto,
kaj transdonos lin al la nacioj, * por moki kaj
skurĝi kaj por krucumi.

2. Jesuo transprenas Sian krucon

Se iu volas veni post mi, li abnegaciu sin, * kaj levu
sian krucon, kaj sekvu min.
Kiu ne prenas sian krucon kaj sekvas post mi, * tiu
ne estas inda je mi.

3. Jesuo falas la unuan fojon sub la kruco

La tutan tagon mi iras *malgaja*. * Miaj internaĵoj estas
plenaj de brulumo.
Ne ekzistas sana loko en mia korpo. * Mi kurbiĝas
kaj kliniĝas treege.

4. Jesuo renkontas Sian patrinon

Simeono diris al Maria: * Vian animon glavo
trapasos.
Kial vi serĉis min? / Ĉu vi ne sciis, * ke mi devas esti
en la domo de mia Patro?

5. Simono el Kireno estas devigata kunporti la krucon de Jesuo

Ili kaptis Simono, Kirenanon, * venantan de la kamparo,

kaj metis sur lin la krucon, * por porti ĝin post Jesuo.

6. Veronika prezentas al Jesuo viŝ-tukon

Sekvu amon kaj mildecon. * Via mildeco estu konata al ĉiuj.

Amo longe suferas, * amo ne celas por si mem.

7. Jesuo falas la duan fojon sub la kruco

Kio estas pli peza ol plumbo? * Pekulo ŝarĝas pekon sur peko.

Vere, niajn malsanojn li portis sur si, * kaj per niaj suferoj li sin ŝarĝis.

8. Jesuo admonas la plorantajn virinojn

Filinoj de Jerusalemo, ne ploru pro mi, * sed ploru pro vi kaj pro viaj infanoj.

Ĉar se oni tiel agas en la suka ligno, * kiel oni agos en la seka?

9. Jesuo falas la trian fojon sub la kruco

Kiel akvo mi disverŝiĝis, * kaj disiĝis ĉiuj miaj ostoj.

Kiam konsumiĝos miaj fortoj, * tiam ne forlasu min.

10. Jesuo estas senvestigata

Virteco estis mia vesto, / kaj mia justeco *vestis min* * kiel mantelo kaj kapornamo.

Ili dividis miajn vestojn *inter si*, * pri mia tuniko ili lotis.

11. Jesuo estas krucumata

Ĉirkaŭis min la ondoj de la morto, * kaj turmentoj de Ŝeol min trafis.

Ne kaŝu Vian vizaĝon antaŭ mi * en la tago de mia suferado.

12. Jesuo mortas sur la kruco

Jesuo, *memoru min*, * kiam vi venos en vian **regon**.

Vere mi **diras** al vi: * Hodiaŭ vi estos kun mi en Paradizo.

13. La korpo de Jesuo estas forprenata de la kruco

Ne nomu min Naomi, * nomu min **Mara**.

Rigardu kaj vidu, ĉu ekzistas *sufero* * simila al mia sufero.

14. La korpo de Jesuo estas entombigata

Se la tritika greno ne falas en la teron **kaj** ne mortas, * ĝi restas **sola**;

sed se ĝi mortas, * ĝi donas multe da **frukto**.

15. Jesuo leviĝas el la mortintoj

Kiu amas **sian** vivon, * tiu ĝin **perdas**;

kaj kiu malamas **sian** vivon en ĉi **tiu** mondo, * tiu ĝin konservos ĝis eterna vivo.


Kalvaria vojo 2

Antifono (6a tonalo):



BENON, JESU' • Antifono • M kaj E: Albrecht Kronenberger 2022-08-12

La stacioj (F-maĵora):



1. Kondamno

La Filo de homo / estos transdonita al la ĉefpastroj kaj skribistoj; * kaj ili kondamnos lin al morto,

kaj transdonos lin al la nacianoj, * por moki kaj skurĝi kaj por krucumi.

2. Kruco

Se iu volas veni post mi, li abnegaciu sin, * kaj levu sian krucon, kaj sekvu min.

Kiu ne prenas sian krucon kaj sekvas post mi, * tiu ne estas inda je mi.

3. Unua falo

La tutan tagon mi iras malgaja. * Miaj internaĵoj estas plenaj de brulumo.

Ne ekzistas sana loko en mia korpo. * Mi kurbiĝas kaj kliniĝas treege.

4. Maria

Simeono diris al Maria: * Vian animon glavo trapasos.

Kial vi serĉis min? / Ĉu vi ne sciis, * ke mi devas esti en la domo de mia Patro?

5. Simono el Kireno

Ili kaptis Simonon, Kirenanon, * venantan de l' kamparo,

kaj metis sur lin la krucon, * por porti ĝin post Jesuo.

6. Veronika

Sekvu amon kaj mildecon. * Via mildeco estu konata al ĉiuj.

Amo longe suferas, * amo ne celas por si mem.

7. Dua falo

Kio estas pli peza ol plumbo? * Pekulo ŝarĝas pekon sur peko.

Vere, niajn malsanojn li portis sur si, * kaj per niaj suferoj li sin ŝarĝis.

8. Virinoj

Filinoj de Jerusalemo, ne ploru pro mi, * sed ploru pro vi kaj pro viaj infanoj.

Ĉar se oni tiel agas en la suka ligno, * kiel oni agos en la seka?

9. Tria falo

Kiel akvo mi disverŝiĝis, * kaj disiĝis ĉiuj miaj ostoj.

Kiam konsumiĝos miaj fortoj, * tiam ne forlasu *min*.

10. Senvestigo

Virteco estis mia vesto, / kaj mia justeco vestis min * kiel mantelo kaj kapornamo.

Ili dividis miajn vestojn *inter si*, * pri mia tuniko ili lotis.

11. Krucumo

Ĉirkaŭis min la ondoj de l' morto, * kaj turmentoj de Ŝeol min trafis.

Ne kaŝu Vian vizaĝon *antaŭ* mi * en la tago de mia suferado.

12. Morto

Jesuo, *memoru* min, * kiam vi venos en vian regnon.

Vere mi diras al vi: * Hodiaŭ vi estos kun mi en Paradizo.

13. Depreno

Ne nomu min Naomi, * **nomu** *min* Mara.

Rigardu kaj vidu, ĉu ekzistas sufero * simila al mia sufero.

14. Entombigo

Se la tritika greno ne falas en la teron kaj ne mortas, * ĝi restas sola;

sed se ĝi mortas, * ĝi donas multe da frukto.

15. Resurekto

Kiu amas sian vivon, * tiu ĝin perdas;

kaj kiu malamas sian vivon en ĉi tiu mondo, * tiu ĝin konservos ĝis eterna vivo.